Espéranto Paris Île-de-France / Esperanto Parizo-Francilio
**Agadraporto 2025**

**ENHAVO**

**1. ADMINISTRADO....................................................1**
1.1 Membraro........................................................1
1.2 Jarkunveno...................................................... 1
1.3 Komitataj kunvenoj..........................................2
1.4 Rilatoj kun Esperanto-France.......................... 2
1.5 Komunikado....................................................2
**2. AGADOJ...............................................................2**
2.1. Kunvenoj......................................................2
2.2. Informado......................................................4
2.3. Instruado.......................................................4
**Anekso: Kelkaj fotoj................................................ 5**

## 1. ADMINISTRADO

### 1.1 Membraro

| 2017 | 2018 | 2019 | 2020 | 2021 | 2022 | 2023 | 2024 | 2025 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 120 | 161 | 156 | 94 | 85 | 115 | 117 | 105 | 103 |

### 1.2 Jarkunveno

La Eksterordinara Ĝenerala Asembleo (EĜA) kaj la Ordinara Ĝenerala Asembleo (OĜA) okazis 23/03/2025, ekde la 10h10 matene, ĉeeste kaj rete. Entute 19 membroj partoprenis: 1 rete, 18 sideje.

Dum la EĜA ni anoncis la rezulton de la reta baloto pri ŝanĝo de la statuto. La proponita ŝanĝo temis pri modifo de la minimuma nombro de komitatanoj, de 9 al 6. La ŝanĝo estis aprobita.

La membroj per la retejo balotilo.org voĉdonis kaj aprobis la Agadraporton kaj la Financan raporton 2024. La 2 raportoj legeblas en nia retejo: esperanto.paris/membro-kunvenoj.

Elekto de nova komitato: jen la nombroj de voĉoj ricevitaj de la 11 kandidatoj:

| Raymonde Coquisart | Romain Curis | Pierre Gauthier | Pascal Hébert | Didier Janot | Aleks Kadar | Aurélien Lestage | François Lo Jacomo | Laure Patas d'Illiers | Viktoro Simonnet | Guillaume Vera-Navas |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| RCo | RCu | PG | PH | DJ | AK | AL | FLJ | LPI | VS | GVN |
| 48 voĉoj | 43 | 48 | 36 | 45 | 44 | 48 | 48 | 51 | 46 | 41 voĉoj |
| ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ | ✅ |

Konklude, ĉiuj 11 kandidatoj estas elektitaj. La nova komitato elektis en si mem novan estraron dum la komitatkunsido de la 28a de marto 2025.
- Aleks Kadar, prezidanto - Pierre Gauthier, kasisto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-France - Laure Patas d'Illiers, sekretario - Viktoro Simonnet, vicsekretario. Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2026.

### 1.3 Komitataj kunvenoj

Inter la lasta jarkunsido kaj la venonta, la komitato kunsidis 5-foje : 2025-03-28 ; 2025-06-27 ; 2025-09-05 ; 2025-12-05 ; 2026-01-16.

- 28/03 : decido doni subvencion (po 20€) al Balotilo kaj al Framasoft, ĉar nia federacio uzas iliajn ilojn.

### 1.4 Rilatoj kun Esperanto-France

Pierre Gauthier estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-France. Diversaj bonvolemuloj de nia federacio helpas ĉe la Ĉerizejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-France kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio

### 1.5 Komunikado

La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo https://esperanto.paris. Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj :

- Retejo DJ https://esperanto.paris/ ;
- Eventa Servo AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Facebook VS https://www.facebook.com/esperanto.paris ;
- X PG https://x.com/esperanto_paris ;
- BlueSky PG https://bsky.app/profile/esperantoparis.bsky.social
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369 ;
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Vacapo: AK VS https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj VS
- JuTubo https://www.youtube.com/@EsperantoFrancilio
- Instagramo AL. Precizigota.

### 1.6 Kontaktadreso

La adreso por kontakti nian estraron estas info@esperanto.paris

## 2. AGADOJ

### 2.1. Kunvenoj

- **Kulturaj vesperoj** : (LPI) ĉiumonate lunde (aprilo ĝis junio kaj oktobro ĝis la ĜA). Tiam okazis diversaj aktivaĵoj, sekvitaj de kuna manĝo. Jen la temoj de la kulturaj vesperoj organizitaj dum la agadjaro:

★ prelego de Melono pri "30 jaroj da agado de Eurokka kaj la nuntempa stato de la Esperanta muziko (03/03);
★ prelego de Eŭhenio Kovtonjuk pri Mediteranea E-Semajno (MES) kaj pri verkaro de V. Eroŝenko (25/03);
★ spektado de la filmo de Gabin Forcier, "Esperante Eŭropen", sekvita de reta diskuto kun Gabin (28/04);
★ prelego de Miguel Angel Gonzales Alfonso kaj Daimi Doval Delsa pri Kubo (12/05);
★ prelego de So Jinsu, prezidanto de Korea E-Asocio (KEA) kaj estrarano de UEA, pri kultura industrio kaj belarta merkato, en Koreio kaj en la mondo (14/07).
★ spektado de 2 filmoj en Eo: « Somero de Sigrid », kun ĉeesto de la reĝisoro, Alexeï Salomatov (16/06);
★ ni ludu ! Ludoj en Esperanto (20/10);
★ spektado de malnovaj fotoj de la unua periodo de nia asocio, komence de la 20a jarcento (17/11);
★ diskuto kun Alice Magdelaine, aŭtorino de la franclingva podkasto "Mia patrina lingvo ne estas la lingvo de mia patrino", kiu publikigis programon pri Esperanto, kun Flora kaj Vito Markov (15/12).
★ prelego de Igor Almeida (Ikvero), vicprezidanto de TEJO, prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), pri Brazilo (pejzaĝoj, lingvoj, kulturo, muzikoj, dancoj...) (15/01/2026)
★ hibrida kunsido kun Pascal Dubourg-Glatigny kaj Agnjeszka Mozer “Kio enestas en la arkivoj de EF?” (09/02).

- **Esperanto-kafejoj** : La Esperanto-kafejo okazas ĉiumonate ĝenerale la duan sabaton. Estas okazo por Esperantistoj por renkonti kaj babili pri io ajn manĝante kaj trinkumante en bonetosaj lokoj. Komencantoj estas bonvenaj. Partoprenas inter 4 kaj 20-o da homoj. Dum la periodo ĝi okazis, dank'al nova organiza teamo: Ludivine Delnatte kaj Cyrille Poullet, en: Bistrot du jardin (15/03); Étoile Gourmet (12/04); Le Rajasthan (10/05), Bistrot d'Antoine (14/06) pikniko en Place des Vosges (12/07); Tashkent (20/09); Le Rempart (18/10); Chez Chris (08/11), Café des Phares (31/01), Durbar (14/02). La 12an/04 estis okazo ĝisi al nia kara eksa kasisto Didier Loison, kiu translokiĝis al Marsejlo.

- **Junulara babilrondoj** por ĉiuj junaj esperantistoj (ĝis 35 jaroj), unu fojon (sabate) monate, en la Ĉerizejo (inter alie 08/03, 12/04, 10/05, 14/06, 11/10, 06/12/2025, 31/01/2026, 07/02)

- **Ĝemelurbaj babilrondoj**: Sub gvido de RCo kaj Debora Rossetti en oktobro 2025 rekomenciĝis la retaj babilrondoj de la ĝemelaj urboj Parizo kaj Romo: Kiu estas via preferata manĝaĵo? (25/10); Ni rakontu: ŝercojn ! (22/11); renkonto kun la ĝemelurbaro de Darmstadt, Germanio (25/01/2026)

- Sabata posttagmeza **diskutrondo** (22/03, 26/04, 31/05, 29/11/2025, 28/02/2026), organizata de RCo, de februaro ĝis novembro 2025 (krom julio/aŭgusto), pri diversaj temoj (UK-j en Francio, radiostacioj, mondvojaĝo dank'al Eventa Servo, Kion vi plej ŝatas kuiri kaj manĝi ?, Parolu al ni pri via esperantista vivo !). Tiuj renkontiĝoj ebligas al homoj kiuj loĝas for de Parizo partopreni kunvenon posttagmeze kaj ne reveni malfrue hejme.

- 29/11: posttagmeza festo por bonvenigi novulojn kaj festi la **125-an jariĝon** de la pariza asocio, en la sidejo. Organizis Régis Fournier, VS, LPI, AK. La ĉeestantaj membroj de la komitato prezentis sin, la asocio montris lumbildaron pri siaj unuaj jaroj (1900-1914) kaj poste ĉiuj dividis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Entute 26 personoj venis, notinde, ni havis la plezuron bonvenigi Sonia Amariglio, iama prezidantino de la asocio. Kun ŝi, ni spektis la televidelsendon pri ŝia dinamika vivo je 98 jaroj! Legu la raporton en Espéranto-Aktiv.

- **ZamFesto** (13/12/2025), 19 rue Traversière apud gare de Lyon, organizita de nia asocio kun la fervojistoj kaj la pariza grupo de SAT-Amikaro. En la programo: dancoj, kanzonoj (Elizabeth Barbay), filmetoj, proverboj kun la publiko, koruso de Lutèce, lotumado. Nia asocio prizorgis la trinkejon (por kiu ni aĉetis 50,65 € da manĝ- kaj trinkaĵoj, enkasigis 89,50 € kaj do faris profiton de 38,85 €) kaj financis spektaklon de la fama tuluza kantisto jOmO.

- La **reĝkuka festo** okazis sabaton la 17an de januaro 2026, venis dudeko da homoj.

- **Esperanto 94** : Post la forpaso de la prezidantino Thérèse Sabatier la 22/12/2023 estis lanĉita alvoko al elekto de nova komitato dum la sekva Ĝenerala Asembleo. La ĜA de La Verda Stelo Esperanto 94 okazis la 15/06/2024 en la sidejo de Choisy-le-Roi. Estis elektitaj: Prezidanto: AL, Sekretario: PG, Kasisto: Sylviane Lafargue, Vic-kasisto: FLJ. Espéranto 94 oficiale donacis la restantajn librojn, la arkivojn kaj la materialojn al Espéranto-France (EF). Xavier Godivier, prezidanto de EF konsentis ricevi la donitaĵojn. Li ankaŭ pretas ricevi ideojn pri donaco de libroj nevendeblaj. EF proponos la arkivojn al la projekto pri arkivoj de Pascal Dubourg Glatigny, por ke ili havu la ŝancon esti profesie prizorgataj de Archives Nationales. Espéranto 94 estas strebanta reakiri aliron al sia bankokonto. AL, prezidanto, ankoraŭ devos skani multajn paĝojn da dokumentoj por sendi al la banko. Kiam Eo 94 havos aliron, ĝi povos doni sian monon al asocio(j). Eo 94 organizis ĜA-n la 4an de julio 2025, sen ŝanĝo de la estraro, por decidi kion fari per sia mono kaj oficialigi ĉiujn donacojn. En la sidejo de Choisy-le-Roi, la ŝrankoj estis malplenigitaj. AL petis rendevuon kun reprezentanto de la urbo por ĉesigi la lukontrakton de la sidejo. Kunsido de eksterordinara asembleo supozeble en 2026. Poste Espéranto 94 povos fermiĝi.

### 2.2. Informado

- **Foiro pri matematikaj ludoj (**12-15/06). Organizis FLJ AL Deĵoris Elisabeth Barbay (EB), FLJ, Lucien Bresler, PG, Sarah, LPI, VS, Laurent V. Helpis ordigi Nathalie K.
La rezulto estis kontentiga. Refoje allogaj estis la duonhoraj kursoj de EB, kiujn ĉeestis deko da lernejaj grupoj. Estis deĵorantoj kaj la publiko interesiĝis. Vizitis la budon interalie Cédric Villani, fama matematikisto, Peter Balaz kaj Dorota Rodzianko, Kongresa Fako de UEA, kaj AK.

- 29/06, prezento de Esperanto al **Mensa** en Parizo, fare de PH, helpe de Julien Darrasse kaj FLJ, bone okazis. 10 partoprenantoj plenkreskuloj kaj poste kelkaj infanoj.

- **Festo de asocioj de Paris Centre** (06/09), ĉe la urbodomo rue Eugène Spuller, la tutan tagon. Nia asocio havis budon. Deĵoris AL, LPI. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.

- **Homara Festo** (12-14/09), en Brétigny-sur-Orge. La budon pagis EF. Organizis Vilĉjo. Deĵoris Lucien, Bubalo, Platano, Gijom Armide, Christian, VS, Sarah, PG. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.

- **Malfermaj pordoj** (27/09), dum la posttagmezo, en nia sidejo. Deĵoris LPI, PG.

- Unuhora **fulmkurso** (03/10), en nia sidejo. Gvidis DJ.


- **Salon européen de l'éducation** (21-23/11), en Parc des expositions, Parizo. EF pagis (1590€ TTC) por la budo (la prezo por firmao estas 6.000€ HT). Organizis FLJ, PG. Deĵoris LPI, Régis Fournier, Lucien Bresler, Jérôme Auclair, Laurent Vignaud, Sarah, VS. Legu la raporton en Esperanto-Aktiv.

- **Verdaj ĉapeloj**: la asocio mendis 100 novajn. Mendu ilin en la Ĉerizejo.

### 2.3. Instruado


De septembro 2025 nia federacio ofertas 2 kursojn:
• ĉeesta por komencantoj, marde de 18h30 à 20h00, PG (1-3 lernantoj)
• ĉeesta por altniveluloj, merkrede de 18h30 à 20h00, FLJ (7 lernantoj)

## Anekso: Kelkaj fotoj

| | | |
|---|---|---|
| 15/03/2025 | Eo-kafejo en Bistrot du Jardin |  |
| 25/03/2025 | Kultura vespero: Prelego de Eŭhenio Kovtonjuk |  |
| 12/04/2025 | Eo-kafejo en Étoile Gourmet   |  |


<table>
<tr><td>26/04/2025</td><td>Posttagmeza diskutrondo</td><td></td></tr>
<tr><td>10/05/2025</td><td>Eo-kafejo en Rajasthan<br>
</td><td></td></tr>
<tr><td>12-15/06/2025</td><td>Foiro pri matematikaj ludoj</td><td>
</td></tr>
</table>

<table>
<tr>
<td>14/06/2025</td>
<td>Eo-kafejo en Bistrot d’Antoine<br>

</td>
<td></td>
</tr>
<tr>
<td>12/07/2025</td>
<td>Pikniko en Place des Vosges<br>

</td>
<td></td>
</tr>
<tr>
<td>06/09/2025</td>
<td>Festo de asocioj de Paris Centre</td>
<td>
</td>
</tr>
</table>

| | | |
|---|---|---|
| 12-14/09/2025 | Homara Festo 2025 |  |
| 20/09/2025 | Eo-kafejo en la restoracio Tashkent<br> |  |
| 21-23/11/2025 | Salon européen de l'éducation |  |

| | | |
|---|---|---|
| 29/11/2025 | 125-jariĝo de Esperanto Parizo |  |
| 15/12/2025 | Kultura vespero kun Alice Magdeleine |  |
| 15/01/2026 | Kultura vespero: Prelego de Ikvero |  |
| 17/01/2026 | Galette des Rois 2026 / Reĝkuka festo |  |

| | | |
|---|---|---|
| 31/01/2026 | Eo-kafejo en Café des Phares<br> |  |
| 14/02/2026 | Eo-kafejo en Durbar<br> |  |